# LA VERDA LUPEO
# FENIKSO

N-ro 59 | 1983 Januaro | 14a jaro

Informilo de Esperanto Ligo Filatelista/Faka Asocio en UEA












**Informilo de ELF-AREK (Faka asocio en UEA)**
**Esperanto Ligo Filatelista**
**Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj**

**Prezidanto/Kasisto:** Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29.I, S-171 44 Solna

**Stampobanko:** Werner Heimlich, D-3040 Soltau, Fröbelstr. 4

**Kotizo por 1983:** 15 IRK, aŭ 36 svedaj kronoj

**Kompilanto de la informilo:** R. Burmeister, DDR 9047
Karl-Marx-Stadt, W.-Firl-Str. 30

**Redaktofino:**
27.12.1982

## Novaj membroj:

Pavel Bożik, Prednadrażie C.3. CS-917 00 TRNAVA
Li kolektas E-pm kaj E-glm.

Czestaw Stykowwki, pk 90. PL-674 00 WOSCSOWA

Ihsan Zulvikary, 4503 N. Central Park. U.S.A.-CHICAGO Illinois
Kolektas: E-aĵoj

## Adresŝanĝo:

Dr. Richard E. Wood, College of Education, ARS-ABHA Saudi-Arabia
Li pretas aĉeti E-filatelaĵojn, ne havas ion por interŝanĝi.

## E-filatelo en P.R. Ĉinio:

Nia kluba amiko Shengtan Song verkis artikolon pri E-filatelo por la Popolĉina filatela revuo. La artikolo priskribas la historion de Esperanto kaj plurajn E-pm. Certe niaj japanaj geamikoj kapablus legi la per ĉinaj ideogramoj verkitan artikolon. Ni kore gratulas al SONG.

## E-pm-katalogo

Ankoraŭ estas havebla kontraŭ 15 IRK tiu speciala E-pm-katalogo. Por novaj klubaj geamikoj ĝi estas utila materialo.

## Novaj glumarkoj:

"Jaro de internacia komunikado 1983.
Formato: 43 x 43. Presetekniko: Ofseto.
Koloroj: 1.flava-nigra-verda. 2/nigra-verda. 3/blua-verda. 4/ruĝa-verda. 5/bruna-verda.
Eldonkvanto: 5000 ekz.

## Pri glumarkoj:

En Fenikso n:ro 20 15-3-72 s-ro Amouroux skribis pri kadro, kiu ĉirkaŭis svisan poŝtmarkon kaj kiu havis enskribon "ESPERANTO LINGVO INTERNACIA 4 SPESDEKO".

Mi kredas, ke tiu ne estis kadro, sed glumarko, kiu havis spacon en la centro por aldoni poŝtmarkon.

Mi memoris tiun ĉi raporton en Fenikso, pro aŭkcio de kelkaj E-aĵoj en Kalefornio, kie kelkaj tiaj kadro-glumarkoj aperis:

1) Sama kadro kiel en "Fenikso", sed Internacia maldekstre, kaj lingvo dekstre.
2) Kadro-glumarko enskribita "FILIPINA INSULARO", kun filipina poŝtmarko centre.
3) Sama teksto kiel n:ro 1, sed 10 SPESDEKOJ, teksto blankaj literoj sur blua fono.
4) Teksto "SVISLANDO/2 SPESDEKOJ/ONI KORESPONDAS/EN ESPERANTO", kun svisa pm.

Kaj fine mi mem havas kun la teksto: FRANCLANDO/kaj ESPERANTO sur tri aliaj flankoj, kun svisa pm.

Tiu ĉi kartoj estis venditaj je prezo de US-dol 50 – 150 popece. Do, ŝajnas, ke ekzistis diversaj tiaj glumarkoj kaj certe aliaj estas ankoraŭ nekonataj.

*Simon*

## Reko-kov de la 65a UK

Ili ekzistas multaj. Tamen en kongreseja poŝta giĉeto ne estis reko-etikedoj. Tiuj kiuj deziris ekspedi registrite, povis ricevi kongresan stampon en la kongreseja poŝta giĉeto kaj la ĉefa poŝtejo poste aplikis la reko-etikedon, kiu cetere estas tute ordinara kaj ne havas rilaton al Esperanto aú al la UK. Dankon al niaj Bartoŝik, Anna-Greta Strönne k.a. pro senditaj informoj lige kun ĉi problemo.

## La ekonomia krizo

Tiu malagrabla fenomeno nun ankaú tuŝis nian malgrandan rondon. Falis la kurzo de la sveda krono, altiĝis konsiderinde pres- kaj ekspedokostoj. Preskaú tridek klubaj geamikoj forgesis pagi la kotizon, sed ricevis senproteste la informilon. Subite do niaj financaj rimedoj finiĝis kvankam manpleno da klubaj geamikoj vere sufiĉe donacis!

Kion fari? Eble eldoni duoblan numeron? Aú pro entuziasmo pagi la 4an numeron el la propra poŝo? Mi proponis, lasi la 4an numeron kaj daúrigi tuj per la 1a de 1983. La kvanto da informoj restas finfine la sama.


Ni ĉi-loke devas atentigi, ke ni ne plu kapablas daúrigi alsendon de la informilo al tiuj, kiuj ne pagis. Jam plurfoje ni atentigis pri eblecoj, kiel pagi kotizojn. De ĉiuj ni petas pardonon kaj komprenemon.

★

La redaktoro dankas al ĉiuj, kiuj sendis informojn kaj fotokopiojn al li. Daúrigu tiel ankaú 1983.

★






## Pri la sendentaj brazilaj E-pm

skribis nia kluba amiko Gert Drucker el Curitiba, ke la brazilaj filatelistoj kolektas tiujn en paroj, ĉar la randoj estas ege mallarĝaj. Tiuj sendentaj estas multekostaj kaj nur malfacile troveblaj. Katalogitaj ili estas en la plej grava brazila pm-katalogo de Ralf Harald Meyer. Jen la eldonkvantoj:

| Numero | Sendenta | Dentumita |
|---|---|---|
| 17 | 3 000 | 100 000 |
| 18 | 2 400 | 300 000 |
| 19 | 2 400 | 500 000 |
| 20 | 2 400 | 500 000 |
| 18 (P) | 4 000 | —— —— (Provo) |

La "Provo" (18 P) havas bluan koloran kiel numero 17. Tiuj poŝtmarkoj estis siatempe venditaj ĉiuj al eksterlando kaj nur multajn jarojn poste la brazilaj filatelistoj eksciis pri ili. Sekve ne povas ekzisti regule stampitaj sendentaj. Kaj la katalogo ankaŭ nur mencias nestampitajn.

Tiuj poŝtmarkoj ĉiuj estas notitaj sur aparataj paĝoj de la katalogo kaj la numeroj estas la samaj kiel por la dentumitaj. (99, 111, 115, 1–18, 111 P)

Estas interese, ke oni tiujn sendentajn pm rajtas laŭ la FIP-regularo ekspozii, sed la hungarajn sendentajn ne. Tio estas nekomprenebla afero, sed fakto, kaj atentinda. Werner Simon nun informis, ke li posedas sendentaj ankaŭ tiujn brazilajn el la jaro 1945 (25 kaj 26). Jen tasko por nia amiko G. Drucker, ankoraŭfoje konsulti la katalogon kaj informi nin pri la afero.

### La Izraela kongresa E-poŝtmarko:

Kun kelkjara prokrasto mi volas informi niajn membrojn pri la anoncita, sed ne aperinta E-pm en Izraelo. Ni scias, ke la 52-a UK en j. 1967 estis preparita en TEL AVIV. Pro la milito inter Izraelo kaj Egiptio ĝi ne okazis. Ĉar ne estis eble tutmonde devoki la jam detale preparitan kongreson, la Centre Oficejo de UEA, kiu regule organizas la universalajn kongresojn kaj respondecas pri ili, en rapido translokigis ĝin al Rotterdam.

La oficiale anoncita kongresa E-pm estis jam presita, sed la tuta eldonkvanto ankaŭ oficiale neniigita. En februaro de sekva jaro 1968 mi ricevis leteron de s-ro Ota Ginz, la famkonata ĉeĥa esperantisto, ne plu vivanta, kiu antaŭ sia elmigro al Israelo meritis pri eldonoj de du serioj de la ĉeĥaj E-tutaĵoj. En letero li skribis jenon pri la afero:

> "Kiel vi scias, la anoncita kongresa poŝtmarko ne aperis, kvankam ĝi estis jam presita. Ni ĉiam esperis, ke nia /israela/ poŝta ministerio tamen konsentos transdoni ĝin por disvendo, sed ĉiu atendado estis vana. Laŭ informo de la poŝta ministerio kostis preso de la kongresa poŝtmarko pli ol 10 mil izraelaj funtoj, t.e. pli ol 3 mil dolarojn. La prezidinto de LKK s-ro Kohen Cedek, diris al mi, kiel bela estis la poŝtmarko kun bildo de Zamenhof sur verda fono."

Niaj historiistoj notu tion, ja estas necese, laŭ mi – jam nun verki historion pri sukcesoj kaj malsukcesoj, kiujn ni renkontas.

/Bartoŝík/

### Pri BRA 33

Kion signifas TROVAS? Gert Drucker klarigis nun, ke TROVAS singifas TROBO (neologismo laŭ profesoro Geraldo Mattos), = poemo, unu strofo kun kvar versoj . . . principe konata en hispanaj kaj portugalaj teritorioj.

Bedaŭrinde la estraro de la EA Sao Paúlo tiun stampon ne stokis kaj sekve ĝi apenaŭ estas trovebla. Eĉ niaj brazilaj klubaj geamikoj ne posedas tiun stampon! En magazenoj ĝi same ne estas trovebla, ĉar ne estas kutimo en Brazilo, stoki specialajn stampojn.

## La Triestaj pm:

La Triestaj 2 koloroj estas nenio nova. Unue la 300 Din.-pm estis presita por Trieste en folioj de 12 pm, kaj poste la sama pm por Jugoslavio en folioj de 8 pm. Poste Trieste mendis 3000 pluajn pm, kiuj ankaŭ estis presita en folioj de 8 pm. La dua presado havis iom pli helan koloron. Ambaŭ folioj estis venditaj unue la 3. julion 53. La marĝenoj de la 8-pm folioj estis private surpresita en ruĝa koloro.

Do ekzistas 12000 pm en 1000 folioj en pli malhela koloro, kaj 3000 pm en 375 folioj de la pli hela koloro.

El la 375 folioj 250 estis surpresitaj private kaj numerigitaj dorse. Do, oni povas kolekti 3 diversajn foliojn, se oni havas monon . . .

*/W. Simon/*

## Hirsch esploras GER 1

Nia kluba amiko Rikardo Hirsch disponigis al la redaktoro diversajn materialojn pri la stampo GER 1 el kiuj eblas konkludi kelkajn por ni gravajn faktojn. Por precizigi la ĝisnunajn ekkonojn estus necese, ke ĉiuj niaj klubaj geamikoj aŭ sendu fotokopiojn pri siaj GER 1-1/1-2, aŭ priskribojn, al s-ro Hirsch. La adreson vi havas en nia adresaro. Bonvolu noti:

- daton de la ronda datstampo
- aspekton de la E-steloj, ĉu kun, ĉu sen kadroj.

Interese i.a. estus precizigi la daton, kiam oni ekuzis la du diversajn datstampojn. GER 1-1 oni uzis verŝajne nur ĝis julio, GER 1-2 kun la unulinia datstampo eble ek de la 30.7.-8.8. Pli fruaj aŭ pli malfruaj datoj ne konatiĝis ĝis nun. La dulinia datstampo ekzistas kun datoj inter 17.1.-1.6.23. La kadroj de la stelo iom post iom malaperis pro ĉiutaga uzado de la stampilo meze de marto 1923.

## SHAPE/S.H.A.P.E.

Pasintjare la belga poŝto uzis stampon i.a. en tiu supre citita loko. Kiel informis D-ro Wood, nia kluba amiko en Saŭdiarabio, kaj Jan Torfs el Borgerhout, ne temas pri urbo sed pri mallongigo por Supreme Headquarters Allied Powers Europe.

## Kastelo Gresillon en stampo?

Nia amiko Pignatelli sendis fotokopion pri maŝinstampo de poŝtejo en Baugé. La reklama porto montras kastelosimilan domon. Li demandas, ĉu eble temas pri tiu Kultura E-Domo. Mi tion ne povas respondi, eble niaj francaj geamikoj?

## Nekonata E-sta trovita (JAFE)

Jam dum jaroj vagabondis supozoj pri nekatalogita E-sta de Jugoslavio tra niaj vicoj. Nia kluba amiko Hirsch, kiu ŝajne havas aliron al ĉiuj filatelaj katalogoj nun definitive ĝin trovis en katalogo pri poŝtaj stampoj de Jugoslavio, eldonita de Suchanek (Meerbusch/FRG, 1978).

Sur la paĝo 151 sub n-ro 44 ni trovas sciigojn pri ĝi:
VRNJACKA BANJA 1965 8.5. 10-jara jubileo de JAFE
(Jugoslava Asocio de Fervojistoj Esperantistaj)

Tiu stampo estas insignoforma kaj verŝajne preskaŭ ĉiam de nelegebla kvalito. Supre troviĝas minilitere la urbonomo, sub ĝi la flugilradoj, sub ili 1955–1965, sub tio stelo en cirklo, kaj tute sube minicifera la dato. Tamen, ĉu nun plene fuŝa aŭ ne, temas pri poŝta stampo, ni ĝin devas akcepti en nian katalogon. Kompreneble ĝi kreas renverson en jugoslavaj stampnumeroj. Cetere en tiu katalogo aperas sciigo, ke la sta de la 16a E-kgr de Ju estas verda. Forstreku do el via katalogo la noton (+ve).

## Aústra E-pk en variaĵo

Nia kluba amiko Anton Straif skriris tre interesan, ĝisdate inter ni nekonatan variaĵon de la aústra E-pk kaj li detale priskribis ĝin en letero al la redaktoro.

La karto havas diversajn ruĝajn surpresojn:
- kadron kun romboj (kiel sur aerogramo)
- rektangulon kun MIT BALLONPOST (per balonpoŝto)
- bordstampon: -DE-DZC-RAIFFEISEN-BORDSTEMPEL
- rektangulon kun infankapo kaj teksto: PRO JUVENTUTE/BAUSTEIN

La enpresita E-pm de 20 groŝoj estas nuligita per speciala poŝta stampilo en 5400 HALLEIN "46a balonpoŝto" je la 26.10.1971 kaj portas pm-flanke poŝtan alvenstampon de GOLLING. Adresita la pk estas al VERLAG ADOLF KOSEL, 1095 Wien, kaj ĝi surhavas ankaú poŝtan reko-markon.

Dorsflanke troviĝas plia surgluita afranko en valoro de 4,50 ŝilingoj kaj alvenstampo de 1095 Wien, 2.11.71. Sur la dorsflanko troviĝas la surpresita teksto:
46. Ballonpost/Gönnermitgliedsausweis der/
ÖSTERREICHISCHEN PRO JUVENTUTE/5021 Salzburg, Fach 28/

Specialkatalogo certe notas la eldonkvanton, bedaúrinde mi ne posedas tian sed interesuloj povas ĝin trovi en la bibliotekoj de filatelaj lokaj kluboj.

## E-poŝtkartoj de Germanio
### (privataj mendoj)

Serio de 6 kartoj:
a) Berlin, Krögel
b) Eisenach, Wartburg
c) Hildesheim, Knochenhauer-Amtshaus
d) Innsbruck, Goldenes Dachl
e) Kufstein, Strateto
f) Mittenwald, ĉefstrato kun preĝejo

Tiu serio aperis trifoje:
Borek-katalogo n-ro 82, F1-6 kun 8-pfeniga pm pri Beethoven
Borek-katalogo n-ro 80, F2-7 kun 5-pfeniga pm pri Schiller
Borek-katalogo n-ro 91, F kun 6-pfeniga pm pri Ebert

Plian Esperanto-bildpoŝtkarton (laú privata mendo) ni trovas en Borek-katalogo n-ro 91, D3 kun 6-pfeniga pm pri Ebert. Tiu poŝtkarto aperis okaze de la 20-jara jubileo de la E-klubo en Aschaffenburg. Mi esperas, ke ni sukcesos montri reproduktaĵon.

La teksto k bildo montras:
Burgo/Aschaffenburg/1912-stelo-1932/ESPERANTO-CLUB'
Aschaffenburg-Main/20a datrevenfesto/oficiala festpoŝtkarto

La Borek-katalogo montras reproduktaĵon de la Hildesheim-pk kaj la teksto sub la montrita bildo tekstas:
Hildesheim, Knochenhauer-Amtshaus/Hildesheim, la plej bela germana urbo, ekzistas jam pli ol/ 1000 jaroj. Unu el ĝiaj plej impresaj kaj kulturhistorie tre/interesaj konstruaĵoj estas la "Oficejo de la osthakistoj", kon-/struita en la jaro 1529. La domo estas la plej grranda konstruaĵo,/kiun mezepoka gildo (la bonstataj buĉistoj) konstruis, kaj ĝi fariĝis/kiel plej granda kaj belekonstruita domĉarpentaĵo la insigno de/Hildesheim.

Tiujn poŝtkartojn ni trovis dank' al la memoro de Simon, kiu en letero al Hirsch sciigis pri antaúmilita E-pk el Berlin. S-ro Hirsch trafosis specialan Borek-katalogon kaj feliĉe trovis supre cititajn sciigojn. S-ro Hirsch sciigis pri la afero vian redaktoron kaj nun vi ĉiuj scias pri la E-pk kaj povas komenci serĉi ilin.

★

Laste informis Simon, Ke nun en aúkcio estis ofertita el supraj tri serioj konstraú 390.– gmk.!

★

## GDR 17 el Bad Saarow

Bad Saarow, tio estas idilia banloko inter Berlino kaj Odro. Tamen tiu nomo jam fariĝis fama en nia Esperanto-mondo pro pluraj Esperanto-seminarioj. Pasintjare tie kunvenis Maertens, Tonkin, Bormann, Szabo-Felsö, Corsetti, Brennan kaj du manplenoj da aliaj E-aktivuloj dum tuta semajno por pridiskuti la agadon por la Jubilea Jaro. Nun okazis en la ripozdomo de la Kulturligo "Internacia Sciencteknika Seminario" de UEA. La vilaĝa poŝtejo havis specialan memorigan, eĉ esperantlingvan, stampon. Tio cetere okazis unuafoje en GDR koncerne Esperanton! Vi devas scii, ke ĉiu speciala stampo bezonas permeson de poŝta ministerio.

La stampo tekstas:
INTERNACIA SCIENCTEKNIKA ESPERANTO SEMINARIO
BAD SAAROW PIESKOW 1
Tempo: 7–12.12.1982

La portreto en la stampo montras la faman svisan kuraciston August Forel (1848–1931). Li estis fidela kaj elstara membro de UEA. Tiu sciencisto kaj verkisto estis fama en la mondo. Inter alie li verkis: "La seksa problemo". Speciale li okupiĝis pri la homa cerbo, kiun li volonte komparis kun tiu de la formikoj. Forel subtenis nian movadon kaj en Esperanto li vidis gravan ilon por forigi la barilojn inter homoj kaj popoloj.

## GDR 18 el Leipzig

La E-klubo en Leipzig denove petis okaze de la Tago de la Esperanto-Libro specialan poŝtan stampon. La stampilo funkciis en la ĉefpoŝtejo de Leipzig dum tuta semajno de 15–22.12.82.

La germanlingva teksto:
15. Dezember Tag des Esperanto-Buches.

La portreto estas la sama kiel de la IFER-stampo 1982: pri Goethe. Per tio oni volis atentigi pri la E-traduko de Faust I far Bartelmess. Tiu traduko aperis en eldonejo de Leipzig en la jaro 1923.

Kiel kutime, akompanas speciala E-pk tiun stampon. Pri la stampo informis ankaŭ la filatela gazeto de GDR.

## Dulinia stampo de Arnhem

Nia amiko Dolfa Bartoŝik denove okupiĝis pri ĝi kaj traserĉis ĉiujn siajn materialojn ligitajn kun la E-domo, kie li antaŭ la milito mem oficis plurajn jarojn. Li nek memoras pri poŝteco de tiu stampo nek trovis iun sciigon. Kaj li pensas, ke ne temas pri poŝta stampo.

Ankaŭ mi pripensis denove tiun problemon kaj sur la bazo de ĉiuj ĝis nun konataj faktoj supozas, sed nur supozas, ke kaj la ovala poŝta kaj la dulinia kontora stampoj estas faritaj en la sama stampilo-farejo. Ambaŭ etis uzataj kun sama inko-kuseno de la buroo aŭ oficejo en la Esperanto-domo. Certe ne oficis poŝtoficisto en la E-domo, sed nur esperantista oficisto, kaj la poŝto donis permeson nur por la ovala stampo.

## Afrankstampo Iisalmi

Jes, afrankstampo! Pluraj geamikoj opiniis, ke estas "vere poŝta stampo". Kompreneble, ankaŭ afrankstampoj estas vere poŝtaj. Ni listigas ilin nur tial aparte, ĉar ili havas apartan karakteron. Pri tio eble nia Simon verku artikoleton, ĉar li estas por tio la plej kompetenta!

Cetere Sennaciulo informis, ke dum tri tagoj la poŝtejo uzis la stampilon, kvankam tio estis uzataj dum pli ol monato!

## Tutaĵo 34a TEJO-Kongreso

En iu el niaj informiloj ni jam atentigis pri tiu tutaĵo, sed ne sciis detalojn, eĉ aúdis neĝustajn asertojn. Mi nun havas ĝin. En Leningrado mi i.a. vizitis la malfilatelistiĝintan A. Dubin kaj donace ricevis tiun raraĵon.

Temas pri normala poŝta koverto kun nominalo de 2 stotinkoj. Tiu koverto ricevis la surpreson (far LKK):
V.TARNOVO/BULGARIO/EMBLEMO/34.INTERNACIA/JUNULARA/KONGRESO/1978/

Estas interese, ke tiuj kongresanoj, kiujn mi demandis, tute ne vidis dum la TEJO-kongreso tiun konverton. Sed ĝi ekzistas kaj same okazis dum la TEJO-Kongreso en Vraca, 1963. La poŝto vendis per filatela magazeno tiun stampon sur speciala koverto. La stampo mem eĉ ne estis en la loka poŝtejo.

## HU 88

Interesa stampo akompanis la E-aranĝon "INTERKOMPUTO 82", ĝi montras siluete la parlamenta domo en Budapesto kaj la emblemon de la "INTERKOMPUTO BUDAPEST 1982". Sub la emblemon la dato XII.27. Kaj la rondon formas hungarlingve: NEMZETÖZI SZAMITAS TUDOMANYI SZIMPOZION. Mankas informo pri la daúro de la uzado kaj traduko de la hungara teksto. La stampo estas de tre bona grafika aranĝo kaj ne estas necesa, uzi lupeon por legi la tekstojn.

Pri la aútoro kaj inicianto de la stampo ne alvenis informoj. Dankon al nia amiko Fekete, kiu sendis la stampon.

## HU 89

28.12.82 aperis en Budapest okaze la 12-a VEF la stampo HU 89 kaj amiko Fekete tuj informis pri ĝi. Temas pri tiu jam pasintjare uzita neĝviro. En mia laúvica stampolisto ĝi okupas pozicion n:ro 637.

## Nova hungara E-pk "Interkomputo"

Niga vigla hungara amiko Fekete sendis saluton al la redaktoro sur nova hungara poŝta karto okaze de la Interkomputo 82.27-an de decembro 1982. La pk havas surpresitan portretan pm pri "Johano Neumann" (1908–1957) en blua/bruna kaj en nominale de 1 forinto. La vendprezo estas 1,40 forintoj. Sur la maldekstra flanko troviĝas la ilustraĵo, kiu montras urban silueton, komputilon, sur paperstrio la tekston KOMPUTO-Scienca Societo Johano Neumann kaj la emblemon INTERKOMPUTO Budapest 1982. La karto estis stampita de 4-lingva poŝta unuataga stampo (ne en E) kaj de 2-lingva (Esperanto-hungara) memoriga datstampo, INTERKOMPUTO 1982.

Ni kore gratulas al la hungaroj, kiuj denove riĉigis nian E-filatelon pere de efika pk!

Ili ĉiam kutimas neatendite surprizi nin.

Antaúe oni nenion aúdis pri tio. Tio certe ankaú okazos dum la UK en Budapest. Estus interese scii, kiu estis J. Neumann kaj kiu iniciatis la pk. Havebla ĝi estas kontraú 2 IRK ĉe amiko Fekete.

## Verda de Harrogate

S-ro Hirsch posedas poŝtan karton kun verda Harrogate-stampo. Apenaú kredeble, ke brita poŝto uzis apud nigra verdan inkon. Kiu el ni ankoraú posedas verdan de Harrogate?

## Stampo Olimpikaj Ludoj 1928

Ofte okazas, ke niaj klubaj geamikoj demandas la redaktoron pri la suvenira folio de la Olimpikaj Ludoj 1928 Amsterdam, eldonita de UEA kaj de la Nederlanda Societo Esperantista L.E.E.N. La folio portas la kompletan specialan pm-serion kaj estas stampita per speciala poŝta stampo kiu ege similas al E-stelo.

Tiu stampo ne apartenas al la Esperantostampoj. Antaú pli ol jardeko nia kluba amiko Dolfa Bartoŝik rakontis al mi, ke aú li aú alia Esperantisto siatempe desegnis la stampon por la poŝto kun la intenco montri Esperanto-stelon. Sed bedaúrinde mankas krom la kvinpinta stelo iu ajn rilato al Esperanto. Tiu memorfolio tamen havas bonan efikon en la filatelista mondo, ĉar la Olimpikoj-specialistoj kolektas nepre tiun folion kaj tiel ion ekscias pri Esperanto el la surpresita teksto.







# 柴门霍夫和世界语

## ——纪念世界语九十五周年

世界语（Esperanto）是一种人造的国际辅助语。它公布于1887年，今年是95周年。

世界语的创造者是波兰眼科医生柴门霍夫（1859—1917）。他诞生于沙俄统治下的波兰比耶里斯托克。比城居住着好几个民族，讲四种语言。在沙俄"分而治之"的政策挑拨下，他们经常发生纠纷。柴门霍夫不理解这是当局推行反动政策的结果，以为是由于语言不通所造成的，因此他老早就努力从事国际语的创造。他把他创造的世界语用"希望者"的名义发表，意思是希望借助这种语言使长期分裂的各族人民相互理解，建成人类友爱的大家庭。

# 3a suplemento por la stampokatalogo
**(eldonita 1978) Decembro 1982**

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| AR | 5 | Rosario | 1973 aprilo | Nacia E-kgr 18a | ms 33x11 |
| | 6 | Rosario | 1973 aprilo | Juvenil de E | ms 33x11 |
| | 7 | Rosario | 1973 19–22.4 | Nacia E-kgr 18a | 35x35 |
| | 8 | San Luis | 1980 12–13.7 | Tutamerika E-kgr | 35 |
| BE | 19 | Borgerhout | 1978 7.4 | Filatela ekspo | 31 |
| | 20 | Antwerpen | 1982 5–6.6 | E - Internationale Taal | 36 |
| | 21-1 | Bruxelles-B | 1982 5–6.6 | Provinca ekspozicio | 36 |
| | 21-2 | Brussel-B | 1982 5–6.6 | Provinca ekspozicio | 36 |
| | 22 | Shape | 1982 5–6.6 | Esperanto | 36 |
| | 23 | Antwerpen | 1982 26–30.7 | UK 67a | 36 |
| BRA | 30 | Bauru | 1979 15.12 | Filatela E-ekspozicio | 31 |
| | 31 | Sorocaba | 1980 23–27.1 | Junulara E-renkontiĝo 3a | 31 |
| | 32 | Sorocaba | 1980 12–16.12 | E en radio | 31 |
| | 33 | Sao Paulo | 1980 15.12 | Paulista E-Asocio | 31 |
| | 34 | Sorocaba | 1981 21–27.2 | Vivu ni en paco | 31 |
| | 35 | Brasilia | 1981 26-30-7 | | |
| BU | 11 | Plovdiv C | 1980 12–14.7 | Nacia E-kgr 40a | as 32 |
| FRA | 44-1 | C. Ferrand | 1978 13.3–13.5 | Kanzona E-konkurso | ms 49x24 |
| | 44.2 | C. Ferrand | 1978 13.3–13.5 | Sama tp kun PP en ds | ms 49x24 |
| | 45 | Cerny | 1979 31.3 | Esperanto-Philatelie | 36 |
| | 46-1 | Perpignan | 1981 2.3–8.6 | Nacia E-kgr | ms 49x24 |
| | 46-2 | Perpignan | 1981 2.3–8.6 | Sama tp kun PP en ds | ms 49x24 |
| | 47 | Draveil | 1981 14.3 | Esperanto-Philatelie | 36 |
| | 48-1 | Orleans 01 | 1982 | Nacia E-kgr | ms 49x24 |
| | 48-2 | Orleans 01 | 1982 | Sama tp kun PP en ds | ms 49x24 |
| | 16 | Dresden 1 | 1982 18–23.9 | 1a distrikta renk. | 40 |
| GFR | 31 | Koblenz | 1980 12.4 | Servo per amikeco | 45x34 |
| | 32 | Regensburg | 1981 16.5–20.5 | IFEF-kgr 33a | 45x34 |
| | | Forstreku: Paderborn 1978 | | | |
| JU | 26 | Rijeka | 1980 18–19.7 | SAT-kgr 53a | 36 |
| | 27 | Rijeka | 1981 25.9 | Trilanda E-konferenco | ni/vi 36 |
| | 28 | V. Banja | 1965 6–8.5 | JAFE | |
| HI | 21 | Gijon | 1979 18–20.7 | Nacia E-kgr 40a | 32 |
| | 22 | Madrid | 1980 21–24.7 | Nacia E-kgr 40a | 32 |
| | 23 | Malaga | 1982 19–20.7 | Nacia E-kgr 42a | 32 |
| GDR | 16 | Dresden 1 | 1982 18–23.9 | Distrikta Renk. | 40 |
| | 17 | Bad Saarow | 1982 7–12.12 | Int. Sciencteknika seminario | 40 |
| | 18 | Leipzig 1 | 1982 15–22.12 | Tago de E-libro | 40 |
| HU | 73 | Tata | 1980 2.5 | Junulara E-renkontiĝo | 35 |
| | 74 | Dunakeszi | 1980 6.7 | Fervojista E-renkontiĝo 16a | 35 |
| | 75 | Gyula | 1980 6–12.7 | SEU | 33 |
| | 76 | Budapest | 1980 28–29.12 | VEF 10a | 33 |
| | 77 | Szombathely | 1981 4.4 | Junulara E-renkontiĝo | 33 |
| | 78 | Pecs | 1981 4.7 | Fervojista E-renkontiĝo | 40 |
| | 79 | Gyula | 1981 6–11.7 | SEU 19a | 28x37 |
| | 80 | Gödöllö | 1981 13.7 | ILEI-konferenco 15a | 35 |
| | 81 | Abaliget | 1981 21–28.7 | IREN 14a | 35 |
| | 82 | Budapest | 1981 28–29.12 | VEF 11a | 33 |
| | 83 | Nyiregyhaza | 1982 9.4 | Junulara E-renkontiĝo | 33 |
| | 84 | Balatonfüred | 1982 3–7.5 | IFEF-kgr 34a | 36 |
| | 85 | Nyiregyhaza | 1982 3.7 | Fervojista E-renkontiĝo | 33 |
| | 86 | Guyla 1 | 1982 4.7 | SEU 20a | 36 |
| | 87 | Abaliget | 1982 21.7 | IREN 15a | 36 |
| IT | 31 | Lido Jesolo | 1979 27.8 | Nacia E-kgr 50a | 40 |
| | 32 | Manfredonia | 1980 8.9 | Nacia E-kgr 51a | 39 |
| | 33 | Lucca | 1980 28.9 | E-ekspozicio | 39 |
| | 34 | Vico Equense | 1982 21.7 | ILEI-konferenco 16a | 40 |
| | 35 | Forte Dei Marmi | 1982 18.9 | Nacia E-kgr 53a | 40 |

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| ME | 1 | Mexiko | 1981 10.7 | TEJO-kgr 37a | 32 |
| PO | 119 | Czestochowa 17 | 1979 15.12 | Zamenhof | 42 |
| | 120 | Bydgoszcz 1 | 1980 31.5 | Internacia E-renkontiĝo | 40 |
| | 121 | Czestochowa 17 | 1980 15.12 | 35 jaroj E en PR Pollando | 53 |
| | 122 | Katowice 2 | 1981 4.4 | Nacia E-kgr 20a | 46 |
| POR | 2 | Setubal | 1980 13.6 | Nacia E-renk. 8a | 32 |
| RUM | 1 | Timisoara | 1981 17–21.9 | E-ekspozicio | ms 51x23 |
| | 2 | Timisoara | 1981 17–21.9 | Esperantologia renk. | ms 51x23 |
| | 3 | Timisoara | 1981 19.9 | Esperantologia renk. 4a | 40 |
| SVE | 23 | Kungälv | 1979 2.6 | Nacia E-kgr | 30 |
| | 24 | Stockholm | 1980 2–9.8 | UK 65a | 30 |
| | 25 | Malmö | 1981 6–8.6 | Nacia E-kgr | 30 |

**Afrankstampoj**


| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 27-3 | 1981 | Paderborn | Sama tp kun aldona "Päkchen" | (pakaĵeto) |
| 28 | 1982 | Antwerpen | ESPERANTO Maandelijks tijdschrift | (F 3640) |
| 29 | 1982 | Iisalmi | SAT-Kongreso 55a | (23-7947) |

## La hungaraj stampoj

Kiam aperos nia nova stampokatalogo, tiam vi trovos por la argentinaj, belgaj kaj hungaraj stampoj ŝanĝitajn numerojn. La trovo de ĝisdate nekonitaj stampoj tion rezultigis. Tiel ni ekzemple trovis, ke ekzistas du diversaj stampoj de Hodmezövasarhely 1947: unu hungarlingva kaj unu esperantlingva! Kompreneble ambaŭ devas posedi proprajn numerojn. Kaj eĉ plie: nur nun ni malkovris ke la hungarlingva aperas en tri variaĵoj: La steleto sube foje havas 4, foje 5, foje 8 radiojn. tion certe mi ne mencios en la katalogo, sed ĉi-loke tion mi volus mencii por niaj specialistoj.

Tiam okazis, ke iel la stampo por la 9a VEF restis neŝanĝita. Iu klopodis savi la aferon kaj forhakis etan peceton el la 8 por fari tiel 9. Vana klopodo, ĉar nenio saviĝis, la peceto estis forhakita en la malĝusta loko. La diferenco apenaŭ estas rimarkebla. Do la stampilo restis la sama, kaj tial en la katalogo restis la sama numero kiel por la 8a VEF. Sed dum la 9a VEF okazis pliaj eraroj, foje mankas ekz. la jarcifero, foje la tagocifero (19...XII 28 kaj 1980. I ...). Eble vera katalogisto eĉ tion notas, sed al mi tio ŝajnas esti troigo momente.

Preskaŭ samjare ankaŭ la Abaligeta IREN kontribuis al konfuzigo de la numera ordo! 1980 oni uzis dum la 13a (!!) IREN la stampilon de la 12a... el la antaŭa jaro. Laborante super la hungara fako mi faris plian malkovron: La stampo de la 7a SEU, Gyula 1969, aperas en du variaĵoj: La viola notas sube en la E-teksto: 7. SOMERA ... kaj en la nigra mankas la 7. Jam nia informilo n-ro 10 pritraktis tiun stampon, sed siatempe neniu atentis pri tiuj diferencoj! Ankaŭ mi ne.






## La E-pk de GDR
### (suplemento)

| | | |
|---|---|---|
| 19 Fondo de EA/GDR | 10/25 pfenigoj | 1981-5 |
| 20 IMEK IIIa | 10/25 pfenigoj | 1981-7 |
| 21 Bulgario | 10 " | 1981-9 |
| 22 Heine/Libro de Kantoj | 10 " | 1981-12 |
| 23 Leibniz | 10/25 " | 1982-2 |
| 24 IFER 82 | 10 | 1982-3 |
| 25 Tago de Paco | 10 " | 1982-9 |
| 26 E-renkonto Dresden | 10 " | 1982-9 |
| 27 W. Ostwald | 10/25 " | 1982-11 |
| 28 E-seminario 82 | 10 " | 1982-11 |
| 29 Kongresfoto 1911 | 10/25 " | 1982-12 |
| 30 Fausto I | 10/25 " | 1982-12 |

### Stampo pri Wilhelm Ostwald

Interesan portretan stampon kun portreto pri la sciencisto Wilhelm Ostwald uzis la poŝtejo en Grossbothen/GDR. Ostwald vivis de 1853–1932, estis Nobel-premiito en la jaro 1909, genia germana scienculo, fondinto de la fizika kemio. Li rigardis la lingvojn el ekonomiaj konsideroj kiel komunikilojn, kiuj pro la diverseco kaŭzas malŝparon de energio. Li estis profunde konvinkita, ke la devo de la scienculoj kaj verkistoj estas krei planitan lingvon por malkonstrui lingvajn barojn. Li aktivadis kiel propagandisto de planlingvaj aferoj Kelkan tempon li estis *amiko de Esperanto,* poste adepto de IDO. Li klare ekkonis la signifon de planlingvo por la scienco kaj por la interpopola komunikado. Kvankam ne E-stampo, ĝi tamen interesu la specialistojn. Havebla la stampo estas sur E-koverto ĉe D-ro Brosche.

### HI 23 en Malaga

S-ro Emilio Folgado Lopez informis pri la stampo kaj koverto de la 42a Hispana Esperanto Kongreso en Malaga, 19-20 julio 1982. La poŝto uzis specialan nuligan stampon, kiu montras ambaŭ datojn 19-20 julio 1982, en kontentiga kvalito. LKK agerigis ilustritajn karton kaj litotukan koverton. La firmao ALFIL kiel kutime aperigis specialan memorigan koverton en plaĉa mezuro. Kial, kiel kutime, oni notas diversajn datojn, tion ni ankoraŭ ne eltrovis. Foje aperas 16-21 julio, foje 19-20 julio.

### IT 35 en Forte Dei Marmi

F. Pignatelli, nia itala kluba amiko, afablis sendi la stampon el la 53a itala Esperanto-kongreso. La kongreso okazis 18-25.9.1982. La stampo havas italan tekston kaj montras turon kun "53". Bedaŭrinde ankaŭ ĉi-tie LKK eldonis litotukajn memorigajn kovertojn, kiuj apenaŭ trovas lokon sur niaj ekspoziciaj filatelaj kartonoj.

### GDR 16 el Dresden

Longe mi pripensis, ĉu ĝin envicigi inter la E-stampojn. Nur pro la fakto, ke ĝia bildo enhavas etan E-insignon, mi fine decidis ĝin akcepti. Sed tro feliĉa mi ne estas pro tiu stampo, ĉar la filatelistoj tutcerte ne rimarkos, ke temas pri E-stampo. LKK de tiu Distrikta E-Renkontiĝo ĉion preparis bonege, sed mankis filatelaj spertoj. La stampo estas germanlingva, mankas mencio, ke temis pri esperantista renkontiĝo. La stampo montras figuron, kiu troviĝas sur la urbodoma turo. Je ĝiaj piedoj lokas tiu malgranda E-insigno.

Same malfeliĉa kiel la stampo aspektas la E-pk. La E-renkontiĝo estis plena sukceso, modela laŭ organizado, nur la filatela klopodo ege lamis.